# Migrado – ĝiaj kaŭzoj kaj sekvoj

**La beograda ĵurnalo “ Alo ! ” en sia eldono de la 12-a de Oktobro faris demandojn al Klaus Hartmann, prezidanto de la Monda Unio de Liberpensuloj, interalie pri la ĉefa temo de la WUF-konferenco de la 14-a de Septembro 2019 en Esch-sur-Alzette (Luksemburgo).**




***Alo!: Fine de Septembro okazis en Luksemburgo konferenco de la Monda Unio de Liberpensuloj, kies prezidanto Vi estas. La temo estis “migruloj”; ĉu vi povas rakonti al ni ion pli pri la aktuala situacio en Eŭropo sub tiu ĉi aspekto?***

**Klaus Hartmann:** Pli precize dirite, temis pri migrado, ĝiaj kaŭzoj kaj sekvoj. Ni demandis, kiu el tio profitas – kial la partoprenantoj en la Monda Ekonomia Pintkunveno de Davoso ripete esprimis sin por subteno de migrado? La respondo evidentas: Ili volas socian dumpingon, ili vidas en la migruloj bonvenajn salajro-premantojn, industrian rezervarmeon.

Tiel migrado kaŭzas sociajn deŝovojn en la akceptolandoj. Sed ankaŭ la devenlandoj estas en sia evoluo malhelpataj, la laborfortoj edukitaj je iliaj kostoj, elmigras.

Por liberpensuloj estis centra temo ankaŭ, ĉu la diversaj religioj nun ĉiuj alstrebas samajn privilegiojn. Aŭ ĉu rajtegaleco kaj paca kunvivado ne evoluas pli bone sur la bazo: nenian privilegion, por neniu.

La situacio en la landoj de la Eŭropa Unio (EU) estas kontraŭdira kaj stampita de principaj interesoj. En la ekonomie pli fortaj landoj la kapital-obeemaj registaroj volas unuflanke plenumi la deziron de entreprenistoj je senbremsa alfluo de laborfortoj, kaj aliflanke ili devas konsideri kreskante kritikan etoson en la loĝantaro, kiu vidas kritike konkurencon je dece pagata laboro kaj je la malabunda pagebla loĝospaco.

La kancelierino de Germanujo, Angela Merkel, per sia “bonvenkulturo” volvis sin en la togon de “humaneco”, dum aliaj, pli malriĉaj EU-landoj devis porti la sekvojn. Sed tiu humaneco estas falsa ludo, pro pluraj kaŭzoj:
1. Kiel ĉefaj kialoj de fuĝo konsiderendas la militoj de la Okcidento.
2. La landoj de la tri kontinentoj estis devigitaj malfermi siajn merkatojn per la maljustaj novkoloniaj ekonomiaj traktatoj de la Okcidento, kiuj forprenas al ili la ekzistobazon kaj la evoluperspektivon.

3. NATO kaj Usono daŭre faras tiel nomatajn “reĝimŝanĝajn” militojn, kun kaŝitaj armea operacoj, ekonomiaj sankcioj kaj laŭcela senpopoligo de tiuj landoj: speciale migruloj en Sirio kaj el Eritreo pro tio estis aparte “bonvenaj”.
Post tio paroli pri humaneco, estas hipokrite.

Alo!: La germana parlamenta delegitino Jacqueline Nastic konstatis, ke Germanujo kondutas hipokrite al Serbujo kaj ke ĝi agnoskis Kosovon tro frue. Kio estas via komento pri tio?

**K.H.:** La tuta politiko de la NATO, de Usono kaj ankaŭ de Germanujo rilate al Serbujo estis kaj estas hipokrita kaj stampita de duoblaj normoj – ekde almenaŭ tri jardekoj. La provizora kronado de tiu politiko estis la NATO-agreso de 1999, kiu ankaŭ okazis sub la mensoga preteksto de “humaneco”.

Ankaŭ tiu estis “reĝimŝanĝa” milito, malfone kontraŭ la prezidanto Milosević, kiun oni faris la pratipo de malbono, sed en la realo, por krei sendependajn ŝtatetojn, dikti novliberalan kapitalismon kaj etendi la potencospacon de la NATO.

Por tiuj celoj de la Okcidento la NATO uzis la albanajn teroristojn kiel infanterion. Ĝi permesis al ili la grandpartan etnan purigadon de la serba provinco Kosovo kaj de Methojia je serboj kaj je nealbanaj civitanoj. Ĝi akceptis la detruon de religiaj kaj kulturaj monumentoj, la komercon per organoj kaj per drogoj kaj la evoluon de sia okupada zono en bastionon de la terorismo.

Kiel rekompencon por tiuj barbaraj servoj la teroristoj ricevis “propran ŝtaton” el la mano de la Okcidento. Tiu ĉi “memstara Kosovo” estas ja milita predo de la NATO,, sed kontraŭa al la popoljuro: rompo de la UN-rezolucio 1244. Pro tio la proklamo de la “ŝtato” same kiel ankaŭ ĉia ĝia agnosko estas nula dekomence.

El tiu vidpunkto la agnosko fare de Germanujo kaj de aliaj okcidentaj ŝtatoj estis ne nur “tro frua”, kiel la germana parlamentanino Jacqueline Natic konstatis – ĝi estis rompo de la internacia juro, konsekvenca daŭrigo de la NATO-agreso.

Sed ne estas tro malfrue por korekti tiun eraron – serio da ŝtatoj jam faris tion per malkonfirmo de la agnosko. Por la estonta evoluo de tiu ĉi Kosovo-problemo oni devas distingi du nivelojn: La principan pretendon de Serbujo pri tiu parto de sia teritorio kongruas kun ĝia rajto je teritoria integreco kaj kun la netuŝeblo de ĝiaj landlimoj, ĝi komplete kongruas kun la popoljuro kaj ne rajtas esti rezignita. Alia demando estas la restarigo de la juro, kaj tio realigeblas ne en mallonga perspektivo, sed nur per longa klopodo, eble nur post pluraj jardekoj. Sed rekte nun necesas atingi plibonigon de la aktuala situacio kaj de la vivkondiĉoj de la homoj; por tio necesas intertraktadoj kaj kompromisoj, kiuj tamen ne tuŝas la principan juran pretendon. Por tio eble la ŝancoj estas nun pli grandaj, ĉar post la elektoj jam ne la ĉefaj militkrimuloj staras ĉe la pinto de Kosovo.

Sed necesas decide rifuzi la postulon de Germanujo kaj de aliaj EU-ŝtatoj, ke Serbujo agnosku Kosovon kiel antaŭkondiĉon por aliĝi al la EU. En tio mi senrezerve konsentas kun la parlamentanino Jacqueline Nastic, kiu nomis tion "ĉantaĝa kaj neakceptebla". Mi aldonas: En tio denove montriĝas la bandita moralo de la NATO-militistoj.

**Alo!: Kien iras Eŭropo? Ĉu la influo de Usono al Eŭropo sub la Trump-registaro estas daŭre la sama? Kiel statas pri la influo kaj la rilatoj kun Ruslando, Ĉinujo, kreskante influhava Barato? Kaj kie en tiu ĉi situacio staras Serbujo? Kion vi pensas pri la aktuala kurso de Serbujo? Kie troviĝas la estonteco? Ĉu en Eŭropo aŭ en Ruslando?**

K. H.: Mi unue klarigu: Se ĉi oni parolas pri "Eŭropo", tiam oni celas la Eŭropan Union. Tio ne estas identa, eĉ se la EU-propagando pretendas solan reprezentadon. Ankaŭ granda parto de Ruslando apartenas al Eŭropo!

Ekde la enpotenciĝo de Trump disvastiĝis ne pretervideblaj koleroj kaj fremdiĝoj ĉe la ceteraj "okcidentaj partneroj". Iliaj motivoj tamen estas negativaj: ili dubas pri la fidindo de Trump kiel malvarma militisto, kiel NATO-partnero, mondpolicisto kaj lancopinto kontraŭ Ruslando. Ili preferus vidi la militkrimulinon Clinton en la Blanka Domo. Trump servas al aliaj kapitalfrakcioj de Usono, kiuj celas tiri iajn profitojn prefere ne unuavice el militoj kaj reĝimŝanĝoj en la tuta mondo.

Ke la komunikiloj en la NATO-landoj nun prezentas Trump-on kiel "nefidindan" kaj "nekalkuleblan", tamen havas pozitivan efikon al la publiko: La fremdiĝo disde Usono kreskas, la malfido al la "okcidenta gvidpotenco" kreskas, plimulto vidas en Trump pli grandan danĝeron por la paco ol en Putin. Stabilaj plimultoj en opinienketoj volas pacon kun Ruslando.

Sendube Usono estas "superpotenco en malkresko", kaj ĝiaj "okcidentaj partneroj" akompanas ĝin ĉe tio. Ĉinlando, Ruslando, ankaŭ Barato pligrandigas sian ekonomian kapablon kaj sian internacian influon. Ni spertas la transformiĝon al multpolusa, al multcentra mondordo.

Envere por landoj kiel Serbujo la demando pri la propra spaco ne devus esti respondebla malfacile: Ĉu oni volas stari ĉe la flanko de la estonta perdanto aŭ ĉe tiu de la kreskantoj?

Krome ekzistas ankaŭ konkretaj argumentoj: Malkreskantaj potencoj fariĝas ne malpli danĝeraj. Ni vidas la politikon de daŭrigata encirkligo de Ĉinujo kaj Ruslando, la NATO-marŝadon ĉe la rusaj landlimoj. Jam la NATO-agreso kontraŭ Jugoslavujo, la instalado de Camp Bondsteel en Kosovo kaj la NATO-membreco de Montenegro ĝis Makedonio estas partoj de tiu agresa kurso kontraŭ Ruslando.

Kion instruas al ni nia propra sperto? Paco en balkanaj landoj regis en la jaroj de la nealianceco. Gvidaj reprezentantoj de la NATO kaj de la EU postulas de Serbujo, ke ĝi devu decidi inter "la Okcidento" kaj Ruslando. La ĉantaĝo estas daŭrigota. Neniu

kun klara menso enlitiĝas kun sia murdulo. Serbujo devus respondi per la slogano de la franca, itala kaj germana pacmovado: Pacon kun Ruslando, kaj for el la NATO!

Lasu min fine ankoraŭ averti kontraŭ la iluzio, ke oni povas esti membro de la Eŭropa Unio kaj estas trankvila pri la NATO. La EU devigas ĉiujn membroŝtatojn je konstanta armado, ĝi havas komunan militkason, ĝi havas por “kazoj de krizo” “Eŭropan Interven-iniciaton” kaj ĝi fortigas sian kunlaboradon kun la NATO. Kaj ĝi devigas siajn membroŝtatojn praktiki sankciojn kontraŭ Ruslando. Tiu EU reprezentas ne la pacon, sed la finon de naciaj sendependeco kaj suvereneco.